piedojn, kaj komencis klinsaluti la Reĝon, la Damon, la reĝajn infanojn, k.c.

"Ĉesu tion" kriegis la Damo "vi donas al mi la kapturniĝon!" Ekvidante la rozarbon, ŝi daŭrigis: "Kion ajn vi tie ĉi faris?"

"Se plaĉas al via Dama Moŝtino" diris Du per tre humila voĉo, starigante sin sur unu genuo: "Ni estas penintaj——"

"Mi komprenas" diris la Damo, kiu intertempe estis apude rigardinta la pentritajn rozojn: "Oni senkapigu ilin!"

La procesio marŝis for, escepte nur tri soldatojn, kiuj restis por ekzekuti la malfeliĉajn ĝardenistojn. Tiuj ĉi kuris al Alicio por ke ŝi protektu ilin.

"Mi ne permesos al ili ekzekuti vin" diris Alicio, kaj ŝi tuj kaŝmetis ilin en grandan florpoton, kiu staris apude. La tri soldatoj, ĉirkaŭvagadinte kelkajn minutojn por serĉi ilin, fine marŝis for por rekuniĝi kun la ceteraj.

"Ĉu iliaj kapoj estas jam for de la ŝultroj?" ekkriis la Damo, revidante ilin.

"Iliaj kapoj jam estas *for*" laŭte kriis la soldatoj "se plaĉas al via Dama Moŝtino."

"Bone" diris la Damo.—"Ĉu vi povas kroketludi?"

La soldatoj ne respondis, sed rigardis Alicion, ĉar por ŝi la Damo evidente intencis la lastan demandon.



"Jes" kriis Alicio avide.

"Venu do" respondis la Dan

"Alicio aligis sin al la p
gastoj, kaj treege ŝi volis sci
zonta."

"Estas . . . estas tre bela t
flanko iu malforta voĉo.

Turnante la kapon, ŝi vidi
Kuniklo marŝas duope kun ŝi k
en ŝian vizaĝon.

"Tre bela" konsentis A
Dukino?"

"Ŝ! Ŝ!" la Kuniklo tuj
orelon, kaj ĵetis zorgoplenan ri
ŝultro. Tiam, levinte sin sur
metis la buŝon al ŝia orelo k
"Oni mortkondamnis ŝin."

"Pro kio" Alicio demandis.

"Ĉu vi diris 'Domaĝe'" diri

"Ne, certe ne!" respondis A
tute ne estas domaĝe. Mi diris

"Ŝi ja survangis la Damor
komencis.

Alicio preskaŭ sufokis sin,
laŭte ridegi.

"Ŝ—!" la Kuniklo murmu
Damo aŭdos vin. Ŝi ja alven
kaj la Damo diris——"

"Ĉeiĝu la ludlokojn" ektond



LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST